## Raporto pri la 78-a Hokkajda Kongreso de Esperanto (HEL) en Kaderu 2-7 (Sapporo)



La 18a de oktobro 2014 (sabato)

1a tago: Ĝenerala kunveno de HEL

La kunveno okazis je 13a horo. La prezido estis s-ro GOTOO Yoŝiharu. Oni raportis ĉi-jaran agadon, kaj decidis venontjaran planon de agado kaj novajn komitatojn. 10 homoj ĉeestis kaj estis unu neĉeesta partoprenanto.

La bankeda festenejo estis la drinkejo "Sen-no-Utage". 5 homoj kunvenis kun s-ro Suno, morgaŭa preleganto.

(Raportas YOKOYAMA)

[De 2a mencio sen s-ro aŭ s-ino]




La 19a de oktobro 2014 (dimanĉo)

2a tago: Publika prelego de SUNO

La kunveno okazis je 10a horo. La prezido estis s-ino GOTOO Sumiko. Ŝi prezentis s-ro KIM Seon-Wook (Esperanta nomo: Suno) venanta el Koreio. Li estas doktoriĝonto, kaj komencis lerni Esperanton antaŭ 2 jaroj.

Li parolis pri profundaafabla amikeco kun japanaj esperantistoj, kiam li estis komencisto. Li insistis, ke Esperanto estas ŝlosilo por restarigi la nunan perditan humanecon. Kaj kio impresis min estis lia insisto, ke veterana subteno necesas por junulaj agadoj.

(Raportas YOKOYAMA)



La 19a de oktobro 2014 (dimanĉo)

2a tago: Publika prelego de SUNO

S-ro Hoŝida interpretis lian prelegon japane. Li loĝas en la urbo Suwon (수원, 水原) sude de ĉefurbo Seulo. Prokisme troviĝas la Monda Heredaĵo, la fortreso Hwaseong (화성, 華城). Ĝi estis faranta dum 2 jaroj kaj 8 monatoj de Yi San (이산, 李祘 –정조대왕, 正祖大王 - La 22a reĝo Jeong Jo de Joseon-Dinastio), kiu estis titlo de korea televiddramo elsendita el la japana sendostacio NHK, por tiu patro mortinta perforte pro politika konflikto.

(Raportas YOKOYAMA)



La 19a de oktobro 2014 (dimanĉo)

2a tago: Publika prelego de SUNO

Jen vidaĵo de la kunveno. 20 homoj ĉeestis inkluzive HEL-anojn. 5 studantoj de Esperanta Rondo de Hokkajdo-Universitato kaj 5 civilulo ĉeestis. (10/6, La konduko pri la prelego estis publikigita matene en la Hokkajda gazedo "Hokkajdo Sinbun".)

Post la kongereso SUNO konatiĝis kun studantoj de Hokkajdo-Universitato en la Universitatejo.

(Raportas YOKOYAMA)



La 20a de oktobro 2014 (lundo)

1a tago de postkongreseto

Jen la parko MOERE-NUMA en la urbo Sapporo. Hoŝida diris, "Kvamkam ne ekzistis problemoj kontraŭ mia grimpo, mia malsuprengrimpo komencis havi malbonan efikon sur miaj genuoj. Sed li helpis min. Mi dankas lin pro lia helpo". Mi pensas, ke koreoj estas afabla al maljunuloj, ĉar Koreio estas lando de konfuceanismo. 5 homoj partoprenis.

(Raportas YOKOYAMA)



La 20a de oktobro 2014 (lundo)

1a tago de postkongreseto

Jen la bordo MUEN en ACUTA de la urbo IŜIKARI. Ni venis por vidigu la ordinarajn vidaĵon de Hokkajdo.

Post tiam en prokisma manĝejo ni manĝis la specialaĵo de ACUTA "Bovlo de rizaĵo kun fritita polpo". Ĝi estas abunda manĝajo, sed tre bongusta, en kiu penetris la basko dolĉa sojsaŭco .

(Raportas YOKOYAMA)



La 21a de oktobro 2014 (mardo)
2a tago de postkongreseto, jen front de la Centro de la lago TOOJA por vizitanto. Matene je 9 horoj 5 homoj partoprenis. (Raportas YOKOYAMA)



Jen la Centro de la lago TOOJA por vizitanto. Antaŭ promenado s-ro Sawaya klarigu la vulkano USU al SUNO.

(Raportas YOKOYAMA)



Sekvante en la Scienca Muzeo pri la vulkano, kiun la Centro instalas, en simulado per tri monitoroj ni spertis vulkaismon de la vulkano USU en la jaro 2000 en fortaj bildoj kaj sonoroj.

(Raportas Sawaya.Y)



La 21a de oktobro 2014 (mardo)

2a tago de postkongreseto

Jen la promenada vojo de katastrofa restaĵo de la kratero KONPIRA en la vulkano USU. Hoŝida sentas, ke viziti la restaĵon estas plena sperto por li, en lia nacio ne troviĝas vuikano. Mi diris al SUNO, “La instalaĵo estis proksime de patrina hejmo”. Li surpriziĝis, aŭdante mian diron.

(Raportas YOKOYAMA)



La 21a de oktobro 2014 (mardo)

2a tago de postkongreseto

La promenada vojo de katastrofa restaĵo.

Mi klarigis al SUNO, “Siatempe mia patrina domo fariĝis trua, kaj ŝi rifuĝis en la urbo Sapporo.” Kaj li maltrankviliĝis pri tio.



La 21a de oktobro 2014 (mardo)
2a tago de postkongreseto

Jen la promenada vojo de katastrofa restaĵo de la kratero NIŜIYAMA en la vulkano USU. La instalaĵo estas la infanĝardena restaĵo de la urbeto TOOYAKO. Ĝi estis forte detruita de la erupcio. (Raportas YOKOYAMA)

Post rigardo de la ruino de la infanĝardeno, Suno proponis al mi, ke ni trinku ion varman ĉe vendejo sur la revenvojo prokisme al la parkumejo, kaj diris al mi, ke li deziras "regaleti" min per varma trinkaĵo. Ŝajnis, ke li sentis sin malvarma kontraŭ la malalta temperaturo, dum mi portis perfekte kontraŭfrostan jakon por vintro.


Li mendis trinkaĵojn al vendistino en la flua japana lingvo, kaj dume ni parolis inter ni en Esperanto, do la vendistino certe prenis lin por japana junulo kaj min por eksterlandano, mi supozis. Suno estas tre bonkora kaj simpatia junulo. (Raportas Sawaya.Y)




La 21a de oktobro 2014 (mardo)
2a tago de postkongreseto

Oni memore fotis SUNO-n kun la aina domo Ĉise en la vulkano Ŝoowaŝinzan kaj la aina heroa statuo Ŝakŝaynu.

(Raportas YOKOYAMA)




La 21a de oktobro 2014 (mardo)

2a tago de postkongreseto: Jen monumenta muzeo de MIMACU MASAO en la vulkano Ŝoowaŝinzan. Laŭ la vico de maldekstro SAWAYA, YOKOYAMA, SUNO, HOŜIDA kaj s-ro MIYAZAWA. S-ro MIMACU Masao precize observis kreskadon de la vulkano Ŝoowaŝinzan dum Dua Mondmilito laŭ skizo per fadeno tirita horizonte.

(Raportas YOKOYAMA)



La 21a de oktobro 2014 (mardo)

2a tago de postkongreseto:

Oni memore fotis nin autaŭe la vulkano Ŝoowaŝinzan. Laŭ la vico de maldekstro HOŜIDA, YOKOYAMA, SUNO, MIYAZAWA kaj SAWAYA.

(Raportas YOKOYAMA)




La 21a de oktobro 2014 (mardo)

2a tago de postkongreseto:

Jen la aina muzeo ŜIRAOI PORO KOTAN. Sopirante Hokkajdon kaj aŭdante radia kurson de aina lingvo interrete, SUNO dancis ainan popoldancon invititante de la oficisto en evento. 4 homoj partoprenis.

(Raportas YOKOYAMA)



La 21a de oktobro 2014 (mardo)

2a tago de postkongreseto:

ŜIRAOI PORO KOTAN.

Mi memore fotis lin autaŭe la enirejo. Estis preskaŭ la fermo de la muzeo pro impeta marŝo. SUNO interesiĝi pri aina kulturo.

Mi rekomendis la ainalingva gvidlibron "Express Ainu-go" de la japana eldonejo "Hakusui-ŝa", kiu estis vendita en la muzeo. Li aĉetis ĝin.

(Raportas YOKOYAMA)



La 22a de oktobro 2014 (merkredo)

3a tago de postkongreseto:

Jen la muzikoskatola muzeo en la urbo OTARU. YOKOYAMA, GOTOO Sumiko kaj Suno promenis en la urbo OTARU.

Post nia promeno en la kanalo OTARU, ni venis al la muzikoskatola muzeo en la urbo OTARU "OTARU-Orugooru-Doo", kiu estas populara kun aŭ ĉinoj aŭ koreoj.

La urbo OTARU estas filmadejo de la japana kino "Love Letter", kiu iam estas bone konata en Koreio. Suno demandis al mi, "Ĉu vi konas la kinon "Love Letter?"

Fine mi diris, "Dankon pro via vizito. Mi sentas, ke Esperanto ligas homon al homo, kaj koron al koro." kaj adiaŭis.

(Raportas YOKOYAMA)